

Ulrich Matthias,  
Monda Himno

*tradukita de Ulrich Matthias*

*Kantebla laŭ la melodio de la Eŭropa Himno (el la 9-a sinfonio de Beethoven)*

Muroj de miljaroj baras  
vojon al tutmonda bon'.  
Inter ni landlimoj staras,  
regas jen perfort', jen mon'.

Kelkaj vivas en mizero  
ne eskapas el malriĉ',  
kelkaj restas en sufero,  
mankas ŝanĉo por feliĉ'.

Inter ni, la nekonatoj  
forgesiĝas simpla ver':  
ĉiuj homoj estas fratoj,  
vivas sur la sama ter'.

Havas ni nur unu mondon,  
sekve ĝin konservu ni,  
formu familian rondon  
por tutmonda harmoni'.

Homa digno, homaj rajtoj  
gvidu nin al nia cel',  
homojn kun malsamaj trajtoj  
ĉiu kun aparta bel'.

...

Homaj rajtoj, homaj devoj  
regu sur la tersurfac'  
por ke plenumiĝu revoj  
por ke realiĝu pac'.

Por feliĉo en estonto  
jen valoras nia pen'.  
Amo estu nia fonto  
por labori por kompren'.

Novaj sentoj, novaj ventoj  
blovu nun tra land' kaj mar',  
floru ĉiuj kontinentoj,  
floru tuta la homar'.

*Traduko de la Germana poemo "Eine-Welt-Hymne" de Ulrich Matthias en Esperanton de Ulrich Matthias en 2011-05-22.*

*Arg-1128-2279 (2015-02-28 12:14:29)*

*Pri la verkinto vidu la retejon <http://www.u-matthias.de/>.*